

Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 6-an de Februaro 2023

Zoma kunsido. Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. La tombo de Isaj Dratwer (Dror, Amri)

Dror: la tombo estas nur sablo, en la fermita tombejo de Bat-Jam - Ĥolon. Ni devus starigi tomboŝtonon (ELI faris tion por Andreo Ŝalomon). Dratwer kaj ties edzino, Anna, estis viglaj esperantistoj; post ŝia forpaso li eĉ heredigis la loĝejon al nia Asocio. **Amri** parolis kun konata de li tombofaristo – tiu petas ĉ. 3,000 NIS por kuŝanta ŝtono, ĉ. 6,000 por kuŝanta kaj staranta ŝtonoj kune. **Gabi:** eble sufiĉus kuŝanta ŝtono, kiu estu levigita iome ĉe la kapoparto, eĉ se tio kostus iom pli. **Eran:** tio aldonus tro multe al la prezo! **Amri** demandas. **Dror:** mi vane provis trovi la tombon de Anna Dratwer. Ĉu Inbar povus viziti la *Ĥevra Kadiŝa* kaj demandi pri ŝi? **Jehoŝua:** eblas telefoni al ili. **Gabi:** en la demando ni devas aldoni al la nomo ankaŭ probablan tempon de la entombigo. **Jehoŝua:** mi ekprovos trovi la jaron, kaj demandas ilin telefone.

2. Israela Kongreso – 13-15 de Aprilo en Tiberiado (Amri)

a) **Amri** invitis magiiston, Frank el Germanio. Li estas ĉ. 40 jara, ŝatas infanojn, alportos sian magi-skatolon. Ni subvencios lian restadon, sed ne la flugojn. Li petis tranoktigon po unu tagon antaŭ kaj post la IK, supozeble en la Tel-Aviva regiono. Ĉu iu akceptas?

b) La evento okazos en hotelo Panorama, la solena vespermanĝo en la proksima Leonardo. Matenmanĝojn indas prepari memstare en la hotelo.

c) **Amri** rezervis 15 ĉambrojn kaj devos redoni la superflujajn ĝis la 15-a de Marto; do, li urĝige alvokos nian membraron, admonante ilin aliĝi rapide.

ĉ) **Dror:** estas pli da aliĝintaj eksterlandanoj ol israelanoj ĝis nun.

d) **Dror:** ĉiu (ankaŭ la samĉambro) devas plenigi apartan aliĝilon kaj devas indiki en la aliĝilo, kun kiu li/ŝi volas esti en la sama ĉambro (aŭ resti sola kaj pagi la duoblon). Ŝajne ni mem devos parigi tiujn unuopulojn, kiuj mendis unu liton en dulita ĉambro.

e) **Dror** poste devos fari plian liston laŭ la ĉambroj kun la nomoj de la tranoktintoj.

f) **Amri:** indas alvoki la homojn, ke ili povas aldoni tranokton sabate kontraŭ plia pago de 150 NIS. Tiel ili povos resti la tutan sabaton, ripozante post la ekskurso, partopreni la vesperan programon antaŭ la PK kaj eviti la densan publikan transporton sabate vespere survoje hejmen.

g) **Mikaelo** promesis jam du artajn programerojn!

3. Israela Esperantisto la vintra numero 2022-23 (Mikaelo, Amri)

a) **Amri**: **Jehoŝua** devos skribi 4 nekrologojn pri: dr-o Aharon Davidzon, Jinon Meiri, Rami Ŝlain kaj Joela Egozi. Pri la ĉi-lasta – la plej bone estus peti de Michal Amir. Mikaelo havas spacon de unu paĝo – do ĉiu nekrologo povas esti 8-linia, kun fotoj.

b) Ĝi devas esti preta ĝis la 15-a de Marto. **Amri** sendos bildojn, **Gabi** provlegos rapide. **Amri** devos mendi kovertojn ĉe la presejo, ĉar Mikaelo ne plu havas eĉ unu. Ĉu la presejo laboros dum la Interfesto de Pesah? Disdono devas okazi dum la IK!

c) Poste estos preparataj la somera numero kaj la vintra numero de 2023.

4. Nia Oficejo (Ŝlomo, Amri)

Ŝlomo volas ricevi la kontrakton kun la subskriboj de Amri kaj Bar Vardi. **Amri** sendos al li (antaŭe jam sendis ĝin al ĉiu estrarano la 5-an de Januaro, sed sen subskriboj).

5. Magazeno por la libroj de ELI (Ŝlomo, Jehoŝua)

Ŝlomo: ĉu lui aŭ aceti? **Jehoŝua**: ni deziras ne nur magazeno de skatoloj unu sur la alia, sed bretaron kun aliro al la libroj = bibliotekon. **Eran**: lui lokon en biblioteko kostus ĉ. 3,000 NIS monate. **Jehoŝua**: ni havas malbonajn spertojn – tiuj libroj malaperis post iom da tempo en la nealireblaj bibliotekaj magazenoj. Ĉu la Biblioteko/Libroservo de UEA akceptus ricevi kelkajn de ni? Ĉu ni sendu al Varsovio? Se la verkaro de Ludovikito estos trovita (ĝi estas ĉe iu el ni) – ĝi estas valorega. **Amri**: ili ne akceptos, se temas pri duoblaĵoj. **Gabi**: tio ne solvos nian problemon. Ĉu akiri kontenerojn kaj teni ilin en la kibuco? **Ŝlomo**: tio ne eblas. **Eran**: la demando NE estas ĉu lui aŭ aceti, sed – kiom tio ĉi kostus? **Decido**: Ŝlomo daŭrigu la serĉadon, NE en la centra regiono, tamen en publik-transporte alirebla loko.

La venonta kunsido: lunde, la 6-an de Marto 2023, je la 20h00

(Alon-Turo-2, hibride).

Protokolis: Gabi Zeevi